# La Hodiaŭa Ĵurnalo

2017-12-15 n-ro 386


# Organizo de Islama Kunlaboro agnoskas Orient-Jerusalemon kiel ĉefurbon de Palestino




UN alvokas donaci 1 700 milionojn da usonaj dolaroj al Sud-Sudano

Jen alia kaŭzo ke La Tutmonda Varmiĝo 'Hiato' ne vere okazis

Per Esperanto por la rifuĝantoj

**La Hodiaŭa Ĵurnalo**

Ĉiutaga publikaĵo kun novaĵoj, aktualaĵoj kaj diversaĵoj – pri la mondo, scienco, socia vivo kaj Esperantujo.

**Misio**
Prezenti interesajn ĉiutagajn publikaĵojn por oportuna legado

Redaktoro
kaj grafikisto: Rafael S. Lima
Revizianto: Andrej A. Peĉënkin
[Андрей А. Печёнкин]

**Kontakto**
hodiauajurnalo@gmail.com

*Sendu viajn aktualajn novaĵojn, en Esperanto, kaj vi verŝajne trovos ilin en la ĵurnalo.*

La redakcio ne nepre subtenas iujn enhavojn aŭ samopinias kun ties aŭtoroj.

*Elŝutu la dosieron, la fontoj, la ligiloj kaj la enhavlisto estas alklakeblaj.*

Farita per: Scribus Open Source Desktop Publishing

Organizo de Islama Kunlaboro agnoskas Orient-Jerusalemon kiel ĉefurbon de Palestino
*Speciala pintkunveno p. 03*

UN alvokas donaci 1 700 milionojn da usonaj dolaroj al Sud-Sudano
*Du trionoj de la sud-sudana loĝantaro bezonas humanitaran helpon p. 03*

Pintkunveno pri la klimato en Parizo: civitana socio kaj NROj mobilizataj
*Defendo de la naturmedio p. 04*

Jen alia kaŭzo ke La Tutmonda Varmiĝo 'Hiato' ne vere okazis
*Ŝajna 'malrapidiĝo' en altiĝantaj surfacaj temperaturoj inter 1998 kaj 2012 p. 05*

Hodiaŭe
*Galaksio p. 06*

Kio gravas por bona vivo en alta aĝo?
*Ĉiutaga moviĝado, bonaj rilatoj al amikoj kaj familio kaj pozitiva sinteno al la vivo p. 07*

Per Esperanto por la rifuĝantoj
*Multaj esperantistoj interesiĝas pri la dramo de la rifuĝintoj p. 08*

Zamenhof-Tago
*Afiŝo p. 12*

# Organizo de Islama Kunlaboro agnoskas Orient-Jerusalemon kiel ĉefurbon de Palestino

La Organizo de Islama Kunlaboro publikigis komunikaĵon merkrede [13 dec 2017] post speciala pintkunveno en la turka urbo Istanbulo, agnoskanta Orient-Jerusalemon kiel ĉefurbon de Palestino.




En la komunikaĵo, la organizo urĝis ĉiujn landojn de la mondo agnoski Palestinan ŝtaton, kaj Orient-Jerusalemon kiel ĉefurbon de Palestino sub la okupado de Israelo. Ĝi alvokis la Sekurecan Konsilion de UN protekti la leĝan statuson de Orient-Jerusalemo kaj malhelpi al Israelo okupi palestinan teritorion.

La komunikaĵo diris, ke la decido de Usono pri agnosko de Jerusalemo kiel ĉefurbo de Israelo estas nevalida. Ĝi kondamnis la unuflankan decidon de Usona Prezidento Donald TRUMP kaj akuzis Usonon, ke ĝia decido atencas la rajtojn de la palestina popolo kaj estas intenca subfosado de ĉiuj klopodoj por paco kaj ankaŭ minaco al la paco kaj stabileco de la mondo.

Irana prezidento Hassan ROUHANI diris dum parolado en malfermo de la pintkunveno, ke Irano volas senkondiĉe kunlabori kun ĉiuj islamaj landoj por defendi Jerusalemon.

Yu
Ĉina Radio Internacia

---

# UN alvokas donaci 1 700 milionojn da usonaj dolaroj al Sud-Sudano

Unuiĝintaj Nacioj kaj aliaj institucioj merkrede [13 dec 2017] alvokis la internacian komunumon donaci 1 700 milionojn da usonaj dolaroj por helpi 6 milionojn da homoj suferantaj de konflikto, malsato kaj malbona ekonomio en Sud-Sudano.



La Oficejo de UN por Kunordigo de Humanitaraj Aferoj diris, ke pro la daŭranta konflikto, akriĝas malsatego kaj subnutrado en Sud-Sudano, kaj se ne estos prenitaj rimedoj, aperos malsatego en pluraj regionoj de la lando. Laŭ freŝa taksado, la sezono de malsatego en Sud-Sudano alvenos pli frue ol kutime. Oni prognozis, ke en la periodo de januaro ĝis marto de la venonta jaro, 5,1 milionoj da homoj alfrontos seriozan nutraĵan mankon.

Ĝenerala vicsekretario de UN pri humanitara agado Mark LOWCOCK raportis al la Sekureca Konsilio la 7-an de decembro, ke la multjara konflikto alportis al la sud-sudana popolo gravan suferon, kaj nun du trionoj de la sud-sudana loĝantaro bezonas humanitaran helpon.

Yu
Ĉina Radio Internacia

# Pintkunveno pri la klimato en Parizo: civitana socio kaj NROj mobilizataj

Dum ŝtatestroj kaj registaroj kolektiĝis en *Boulogne-Billancourt*, pariza apudurbo, la civitana socio mobiliziĝis. Preskaŭ 500 aktivuloj pri defendo de la naturmedio kolektiĝis ĉi-mardon la 12-an de decembro [2017] matene, antaŭ la Panteono en Parizo por koregrafio, celanta priatentigi la publikan opinion, kaj la registarajn ĉefojn, per slogano: «Eĉ ne eŭron plian por la fosiliaj energioj».




Motivigo ja ĉeestis. Ekde la 7-a horo kaj duono ĉi-matene, la unuaj ĉapeloj aperas en la malvarmo de la Placo Panteono. Meze de jularboj, la aktivuloj nigre vestitaj malaperas sub grandega drapo petrolblua, simbolo de la naftoverŝo de la fosiliaj energioj. Lucien JALLOT kaj Noé BODAU estas studentoj, pli kaj pli koncernataj de la klimataj demandoj: «La civitanoj volas montri, ke ili estas tie por provi ion», «Eĉ kiel civitanoj, mi opinias ke ni povas agadi. Mi fermis mian bankkonton ĉe la *Société générale*, por malfermi alian ĉe la *Crédit coopératif*. Koncerne financadon, ni povas agadi».

Kantoj liberigis poste la malliberulojn el la naftoverŝo, kaj la nomoj de privataj kaj publikaj societoj aperis sur afiŝtabuloj: *Caisse des dépôts*, Monda Banko, aŭ Franca Agentejo pri disvolviĝo (AFD), kiuj, laŭ la NROj, ŝajne investas en fosiliajn energiojn: «La Franca Agentejo pri disvolviĝo pretiĝas financi projekton ligitan al karbo-centralo en Ĉinio, en regiono situanta sur la Silka Vojo, kie ekzistas grandegaj ekonomiaj interesoj. Tio starigas demandon pri la celo de tia agentejo, koncerne disvolviĝon», substrekas Armelle LECONTE, respondeculino de la klimat-pledado ĉe *Oxfam France*.

«Pli varme ol la klimato», kriegas la aktivuloj videble varmigitaj, kiuj akompanas la balaistojn, blanke vestitajn – ĉi-foje -, venintajn ĵeti la fosiliajn energiojn en gigantan rubujon.

Laŭ Audrey PULVAR, prezidantino de la Fondaĵo por Naturo kaj Homo:

«Francio, Eŭropa Unio kaj kelkaj landoj el la mondo daŭre financadas projektojn, investojn, infrastrukturojn ligitajn al fosiliaj energioj, kiuj kostas ĉiujare ĝis centoj da miliardoj da eŭroj. Tio estas nekohera kun la celo de tiuj interkonsentoj de Parizo, nekohera kun niaj engaĝiĝoj pri reduktado de niaj emisioj de forcejefikaj gasoj… »

Laŭ Clémence DUBOIS, proparolantino de la asocio *350.org*:

«Eĉ ne plian eŭron» estas la plej simpla postulo… tio estas postulo, kiu kostas nenion, sed kiu povas enspezigi multe. Ĉar ni postulas finfine, ke tiuj financaj rimedoj estu vere direktataj al la energia transiro».

Neniam Milito Inter Ni

# Jen alia kaŭzo ke La Tutmonda Varmiĝo ‘Hiato’ ne vere okazis

Tio estas la hiato kiu neniam okazis: ŝajna ‘malrapidiĝo’ en altiĝantaj surfacaj temperaturoj inter 1998 kaj 2012, kiu kuraĝigis neantojn de klimata ŝanĝo nomi tutmondan varmiĝon artefarita konspiro kaj eĉ mistifiko.



Por esti klara, danke al la lukto de sciencistoj, tiu ‘paŭzo’ en tutmonda varmiĝo tute estas refutita, sed nova esploro substrekas alian kaŭzon pro kiu ni unue eraris: manko de datumo.

Atmosfera sciencisto Xiangdong Zhang el la universitato de *Alaska Fairbanks* diras ke unu el la historiaj problemoj de tutmonda averaĝa surfaca aero temperaturo (SAT) de sciencistoj estas ke ili estas nekompletaj.

Specife, manko de leĝaĵoj prenitaj en Arkto pro la manko de mezuriloj en ilia origina loko, signifas ke ni ne tute akomodis pliiĝojn de Arkta temperaturo en la tutmonda perspektivo.

Por pritrakti tion, Zhang kaj similaj esploristoj analizis temperaturo-mezurojn de buoj drivitaj en la Arkta oceano – la internacia Arkta buo – kaj uzis ĝisdatigitajn datumojn de la surfaco de la maro de la nacia oceana kaj atmosfera administro (NOAA).

La teamo diras ke rezulte estas la unua datumaro de surfaca temperaturo kiu dece enkalkulas la Arkton dum la tiel nomata tutmonda varmiĝa paŭzo – kaj tio estas alia malavantaĝo por la hiato.

Zhang diras: ni rekalkulis la averaĝajn tutmondajn temperaturojn el 1998-2012 kaj trovis ke la proporcio de tutmonda varmiĝo daŭre rapidiĝis je 0,112°C po ĉiu jardeko anstataŭ malrapidiĝi je 0,05°C po jardeko kiel oni antaŭe pensis.

La resultoj ankaŭ rimarkigas ke kiel konsiderinte la Arkto varmiĝis en tiu periodo – indikante ke ĝia foresto en tutmondaj averaĝoj estis io kio helpus plifortigi la apero de neekzistanta malrapidiĝo.

Zhang diras: ni taksis novan proporcion de Arkta varmiĝo je 0,659°C po ĉiu jardeko el 1998-2014.

“Kompare kun la ĵus taksita tutmonda varmiĝa proporcio de 0,130°C po jardeko, la Arkto varmiĝis kvinoble ol la tutmonda averaĝo.”

La trovaĵoj daŭrigas la draman historion de scienca esploro, indikante ke la tutmonda varmiĝo hiato ne estis kion ĝi ŝajnis esti.

Antaŭ nelonge, studo publigita en januaro gvidata de esploristoj ĉe la universitato de Kalifornio, Berklio, subtenis la rezultojn de NOAA kiu atribuis la ŝajnan malrapidiĝon al eraroj faritaj en mezuradoj de temperaturo.

NOAA esploristoj en 2015 diris ke la perceptita malrapidiĝo en varmiĝo de oceano estis pro teknika transiro en kiel ni registras temperaturojn.

Kiam sciencistoj prenis el la ŝipo-mezuriloj la buo-datumojn (dum la jaroj de hiato), la 'malvarma inklino' eniris en la datumon – ĉar ĝenerale buoj registras pli malvarmajn temperaturojn kompare alŝipoj, kiuj kaŭzas la ĉirkaŭa varmego kaj malpravigas la datumojn.

Dirante al la publiko pri tiu eraro, la NOAA-esploristoj kiuj trovis la eraron estis akuzitaj ke ili ŝanĝis siajn datumojn kaj estis publike taskitaj doni pruvon pri sia esploro – kaj la kalumnio eĉ dauras ĝin nun.

La Berklia esploro ĉi-jare pravigis la eltrovaĵojn de NOAA – rezulto pri kiu unu el la originalaj membroj de la NOAA teamo diris: "ne surpriza sed kontentiga."

Sed tio montras ke, eĉ forgesante reguliĝi por malvarmaj inklinoj de buo – aŭ malsukcesante inkluzivi precizajn datumojn por regiono tiom vasta kiel Arkto – viaj konkludoj samkiel iliaj datumoj estas bonaj.

Zeke HAUSFATHER klimatasciencisto, unu el la membroj de Berklio teamo, diris al *The Christian Science Monitor* en januaro, "ni daŭre devas esti gardemaj al potencialaj inklinoj en nia kompreno"

"Ne ekzistas perfekta mezuro-sistemo, precipe por longaj periodoj da tempo."

ZHANG esperas ke la nova esploro helpas la sciencistojn – kaj iu ajn kiu zorgas pri klimata ŝanĝo – kaj ne forgesi pri la okazaĵoj de Arkto, ne gravas kiom ĝi estas negastama kaj malproksima.

ZHANG diras: "La arkto estas malproksima nur laŭ fizika distanco."

"Laŭ scienco, ĝi estas proksima al ni ĉiuj. ĝi estas necesa parto de la ekvacio, kaj la respondo influas nin ĉiujn."

La trovaĵoj estas informitaj en *Natural Cklimate Change* [Natura klimatŝanĝo](vidu).

scienco.ir



## Bildo de la tago

**Objekto de *Hoag*, ringa galaksio malkovrita en 1950.**

**Vikipedio**

# Kio gravas por bona vivo en alta aĝo?

Ĉiutaga moviĝado, bonaj rilatoj al amikoj kaj familio kaj pozitiva sinteno al la vivo: Per tiuj elementoj laŭ ekkonoj de esploristoj eblas bone altaĝiĝi - kaj fariĝi surprize feliĉa. Sed multaj homoj sentas timon pri la tre alta aĝo.



Ne nepre sana, sed vigla - tiel sentas sin multaj homoj pli ol 90-jaraj kiuj havas ankoraŭ plejgrandparte memdecidan vivon. Laŭ aktuala studaĵo, ili estas ofte eĉ pli feliĉaj ol 70-jaruloj. Se oni havas pozitivan sintenon al la vivo, malvastajn sociajn rilatojn kaj ĉiutagan moviĝadon, tiam eĉ malsanoj apenaŭ ĝenas la bonfarton.

Germanaj esploristoj volis konstati ĉu tiuj altaĝaj homoj estas aparte sanaj, bonhavaj aŭ kleraj? Kaj fakte montriĝis ke krom la aĝo la altaĝuloj apenaŭ havis ion komunan: ili estis aŭ meze kleraj aŭ tre kleraj, ili aŭ vivis en luita loĝejo aŭ en propra domo. Kaj la enketitoj devenis aŭ el pli bonaj aŭ el malpli bonaj kvartaloj de la urbo.

Plej multaj el ili havis iun malsanon kaj tial prenis averaĝe ses medikamentojn ĉiutage. Malgraŭ tiuj malsanoj la enketitoj sentis sin surprize sanaj. Kaj kvankam ili pli ofte havas sanproblemojn ol pli junaj homoj, ili estas superaveraĝe pli vivoĝojaj kaj optimismaj. Ili montras tute apartajn fortojn. Tial la esploristoj nomis ilin "viglaj 90-jaruloj", ĉar ili ne estas sanaj sed viglaj. La partoprenantoj en la studaĵo aĝis averaĝe 92 jarojn, sed sentis sin averaĝe kiel 72-jaraj.

Proksimume la duono de la pli-ol-90-jaruloj respondis je la demando: "Kiom kontenta vi estas pri via vivo?": "Plene kontenta". Ĉe homoj inter 70 kaj 90 jaroj tion diris nur duone tiom da ili. Kaj plej multaj altaĝuloj volas eĉ fariĝi pli aĝaj: Tri kvaronoj diris ke se ili daŭre bonfartos kiel ĝis nun, ili ŝatus ankoraŭ vivi dum tri ĝis kvin pluaj jaroj.

Kio unuigas la viglajn altaĝulojn estas, ke preskaŭ 80 procentoj el ili plenumas ĉiutage dum almenaŭ 30 minutoj korpan aktivecon. Kaj 90 procentoj nomas homon kiu estas grava al ili kaj kun kiu ili havas proksiman rilaton kaj sentas ĝojon. Krome ili atentas pri ekvilibrita nutrado, pri sufiĉe da trinkado kaj koncerne alkoholon kaj cigaredoj ili pretas nur pri modera konsumo.

Ĉu oni en alta aĝo povas vivi bone kaj feliĉe, tio rilatas kun multe pli ol kun malsanoj. "La subjektiva vivovolo estas multe pli grava ol la demando ĉu oni havas artrozon", diras esploristo. Se tiu vivovolo iom post iom malaperas, tiam ankaŭ la morto alproksimiĝas. Tial neniam estas tro malfrue entrepreni ion kio helpas konservi pli da vivovolo.

Esperanta Retradio

# Per Esperanto por la rifuĝantoj

Multaj esperantistoj interesiĝas pri la dramo de la rifuĝintoj (ĉu rifuĝantoj? ĉu iam rifuĝontoj?) Mi tion scias, ĉar pasintsomere en Seulo en la kadro de la Internacia Kongresa Universitato kaj kunlabore kun la Akademio de la Sciencoj de San Marino, mi gvidis kurson pri la movado de solidareco kun la rifuĝintoj en Eŭropo. Pro forta horzonozo kaj dormomanko la rezulto miaflanke estis nur duonkontentiga. Tamen, la komentoj de la ĉeestintoj estis tre pozitivaj. Sekve, tio plene ŝuldas al la graveco de la temo. Fakte, kelkaj el ili ja aktivas loke en la solidara agado por la rifuĝintoj, kiel OLEV en Svedio kaj pluraj homoj en Francio. Dum la lasta sesio mi demandis al la partoprenantoj kion esperantistoj povus fari tiurilate. Jen kelkaj konkludoj prie.




Ĝenerale, ili vidas esencan rilaton inter la valoroj de esperantismo kaj la solidara agado kun la rifuĝintoj. Pro tio ili bedaŭras ke tiu afero ne aperas pli ofte en niaj revuoj kaj debatoj, aŭ kiel ĉefa temo de universala kongreso. Jen ekzempla opinio: "Mi tre dankas tiun kurson, ĉar tiu temo ege taŭgas. Mi tute ne komprenas la sintenon de niaj plej elstaraj organizaĵoj, kiel UEA pri tiu temo". Simile, "mi ŝategus, ke la kurso povus esti pli longa, kun detaloj de la aktivula agado". Rumanino daŭrigas tiun esencan rilaton, konfesante ke "mi hontas, ke nia lando ne estas por rifuĝantoj alloga lando".

Koncerne konkretajn proponojn, multas ideoj por influi la publikan opinion en kaj ekster Esperantujo, kiel "reagi per opinienhavantaj dokumentoj", "informi en la gazetaro por konsciigi ĉiujn", "kontribui al kreo de tutmonda perspektivo pri la temo" kaj "organizi debatojn eĉ nacilingvajn pri la konfliktoj inter diverspartianoj". Tiel, oni konsilas nin ne paroli nur kun samideanoj, ĉar "eviti kontaktojn kun ekstremdekstruloj signifas ilian estontan venkon, kiel en Francio". Jen pripensinda argumento, kiu lastatempe ĉefrolis en intensaj debatoj en la diskutforumoj de SAT pri la rajto de memesprimo en la oficiala organo Sennaciulo.

Inter la seulaj ideoj, ankaŭ oftas la kunlaborado kun tiuj organizoj kaj individuoj, kiuj jam helpas loke kaj internacie. Interalie, ili petas "praktike helpi neregistarajn organizojn" kaj "partopreni la lokajn helpajn agadojn". Tio estas partopreni la jam ekzistantan socian movadon de solidareco kun la rifuĝintoj. Tiel ni povus "fari kiel aliaj internaciaj volontuloj", ekzemple, "informi pri la agado kaj helpideoj, kiuj ekzistas en diversaj landoj kaj pri la ebloj kunagi pere de monkolekto, traduko de informoj aŭ rekta helpo al certaj homoj". Kelkaj el tiaj proponoj estas sufiĉe konkretaj, nome "financa solidareco por enskribi la junulojn en agadoj organizitaj, sportaj agadoj por ĉiuj, ktp". Tiusence, kutimas la mencio pri "helpado al la infanoj de migrantoj por enskribiĝi en la lernejo" kaj en "organizitaj ferioj". Kaj ne malofte aperas ankaŭ la lingva dimensio de la afero, ekzemple, "instruado de la loka lingvo, precipe al la infanoj kaj junuloj" aŭ "manifestacioj du-lingve (per dulingvaj ŝildoj)". Kompreneble, tio surprizos neniun, ĉar oni jam scias ke averaĝe esperantistoj pli interesiĝas kaj sentemas pri lingvaj temoj ol la ceteraj homoj.

Sekve, stariĝas proponoj por subteni la

lingvajn rajtojn de ekzilitoj – oni uzas tiun vorton por ne diferencigi inter migrantoj kaj rifuĝintoj – eĉ en niaj renkontiĝoj, kiel en la pasinta UK en Seulo. Tiel, "estintus tre amuze kaj grave se ni povus profiti la okazon de la kursfermo por inviti samideanojn de la 'ekzilintaj' landoj por fari komenton el sia vidpunkto". Prava konsilo, mi devintus tion elpensi antaŭe.

FRANCINO, kiu havas sperton pri tia solidara agado avertas tamen, ke "ĉefe ili deziras lerni rekte la anglan". Pro tio ŝi sugestas, ke "ni lernu simplan anglan por komunikiĝi kun ili". Tiu ideo memorigas min pri la sugesto de Giuliano TURONE en la paĝoj de la revuo Esperanto [de UEA] pri la rolo de tiuj esperantistoj, kiuj scipovas la araban. Temas pri ideo, kiun oni ankaŭ debatis en la UK de Nitro en 2016 kun la sugesta konkludo pri amasa lernado de la araba. Ĉu ni jam plenumis ĝin?

En mia propra sperto, vizitante la tielnomatan ĝangalon de *Calais* (Kalezo) en la nordo de Francio, mi observis ke la araba estis la ĉefa komunika lingvo inter la ekzilitoj, kvankam ili venis el 30 malsamaj landoj kaj sekve, multaj el ili ne komprenis ĝin. Dume, la franca estis la ĉefa lingvo uzata de la lokaj aktivuloj (kaj kompreneble en la franca ŝtata sistemo), kaj la angla de la internaciaj volontuloj, kiuj venis precipe el Britio. Do, la scipovo de la araba ja helpus, sed tio ne tute solvus la lingvan problemon, kiu certe ekzistas. Ĉu ŝanco por Esperanto?

Tiurilate kelkaj proponoj emfazas eblajn rolojn de nia lingvo. Ekzemple, "ni provu instrui Esperanton, por ke la rifuĝintoj interkompreniĝu inter ili". Aliaj petas "trovi rimedojn por venigi etulojn al la infana kongreseto". Tamen, ne ĉiam ekzistas espero tiurilate. Tiusence, "oni povus instrui al ili Esperanton, sed tio estas nur idealo!" Ĉu estas tamen iu espero por tion fari? Miaopinie, jes. Fakte, laŭ alia partopreninto en la seula kurso, "kelkaj esperantistoj jam instruas Esperanton ene de rifuĝintaj loĝejoj, mi aŭdis". Tiu opinio pravas. Mi persone konas plurajn kazojn. Hélène DUBOIS, kiu partoprenis la kurson en Seulo, klarigas al ni sian travivaĵon prie. "En Treagstel (Bretonio, Francio) ni ĝemeligis esperantistojn kaj rifuĝantojn, ĉar persona kontakto gravas." Tiel, la rifuĝanto povas kontakti tiun specialan helpulon laŭbezone. El tiu perspektivo, gravas ankaŭ, ke oni donu al ili liberan tempon por ke li interkonatiĝu kun la ricevanta socio. "La rifuĝantoj en Tregastel ŝatis multe promeni kaj viziti la urbodomon, ludi ludojn, malkovri bretonajn dancojn, ktp. Ankaŭ ili kuiris manĝaĵojn el siaj landoj".

Héléne daŭrigas sian detalan proponon klarigante plurajn kialojn por lernigi al ili Esperanton, "se rifuĝantoj tion ŝatus". Unue, ĉar ili havas tempon por lerni. Jen gravega kialo, pri kiu ĝenerale homoj ne konscias. Kiam en la somero de 2016 mi vizitis Calais, mi konis homojn, kiuj loĝis tie dum pli ol unu jaron. Dum la nokto ili klopodis atingi Britio, laŭ ĉiam pli riskaj vojoj. Dum la tago ili havis nenion por fari. Kaj mi trovis similajn situaciojn en aliaj mondopartoj, inkluzive de Sebto (aŭ Ceŭto) kaj Melilo, kie la ekzilitoj atendas dum monatoj (kaj ofte jaroj) la decidon pri sia rajto loĝi en Hispanio kaj sekve en Eŭropo.

Fakte, tiu tempa afero ne estas nova en la historio de la Esperanta movado. Kiel sciate, en diversaj periodoj konataj kaj malpli konataj esperantistoj lernis la lingvon kiel rifuĝantoj (ekzemple, la hispanoj kiuj pasigis jarojn en la francaj koncentrejoj post la hispana enlanda milito) aŭ en malliberejo dum (mond)militoj en Siberio kaj aliloke. Kial ili sukcesis tion fari? Interalie, ĉar ili

havis tempon. Resume, ne multajn rimedojn ili havas, sed rifuĝantoj tempon ofte ja havas.

Due, Héléne daŭrigas, "ĉar Esperanto estas skribita per latinaj literoj." Jen elemento (inter multaj aliaj, kiujn ni ĉiuj bone konas) kiu povas faciligi la lernadon, kune kun la ceteraj, kiel fonetika reguleco, gramatika logiko, relative malgranda vortprovizo, ktp. Tio estas, Esperanto relative facile lerneblas. Jen avantaĝo ĉiam substrekinda.



Trie, la Zamenhofa lingvo faciligas la lernadon de aliaj lingvoj, kiel la franca aŭ la angla. Temas pri la fama propedeŭtika valoro de Esperanto. En *Calais* mi konis junajn homojn, kiuj sufiĉe bone lernis la francan dum kelkaj monatoj. Tamen la plejparto de plenkreskuloj ne kuraĝis tion fari eĉ post pli ol unu jaro. "Estas tro malfacile, tro malfrue por ni". Ĉu ili kuraĝus lerni pli racian lingvon? Kaj ĉu tio donus al ili la necesan memfidon por entrepreni la lernadon de aliaj lingvoj?

Kvare, s-rino DUBOIS mencias aspekton, sufiĉe malkonatan ekster Esperantujo: "Esperanto donas reton da esperantistoj tra Eŭropo". Kaj, mi aldonus, ne nur tra Eŭropo. Tiurilate, en Flandrio oni klarigis al mi, ke lokaj esperantistoj jam helpis afrikan samideanon studi kaj leĝe loĝi en Belgio. Ili tamen opinias, ke ne ĉiuj, kiuj petas tian helpon, estas fidindaj. Mi verŝajne konsentas, sed respondas jene: Ĉu ne veras, ke multaj el ni pli facile pretas helpi alian homon kiam ni scias ke temas pri esperantisto? Ĉu Pasporta Servo ne funkcias laŭ tiu simpla principo? Fakte, en nia historio ekzistas pluraj kazoj de tia subteno, inkluzive de la aŭstraj infanoj, kiujn helpadis hispanaj samideanoj post la unua mondmilito, aŭ pli freŝdate tiuj bosniaj infanoj, kiuj pere de lokaj samideanoj pasigis iom da tempo en Katalunio dum la milito en Bosnio. Jen du ekzemploj, kiuj povus inspiri nian estontan agadon rilate al tiu ĉi temo.

Kelkaj esperantistoj, kiuj venas de landoj kun relative granda procento de migrantoj, petas tamen ekvilibran analizon. Jen la proponoj de germanino tiurilate: "prelegoj, gazetartikoloj, retpaĝoj pri la situacio kaj pri leĝaj rajtoj kaj devoj, sed ankaŭ honeste paroli pri la problemoj, kiuj ekestas pro la malamikeco inter la diversaj grupoj de la migrantoj (inter si) kaj la civitanoj de la enirantaj landoj".

Interese estas, ke multaj proponintoj situigas la temon de la rifuĝintoj en pli ampleksa kunteksto. Pro tio, ili konsilas nin "lukti por pli justa ekonomio kaj ekologio" kaj ke "ni laboru por paco, amikeco, neperforto, toleremo", ke "ni emfazu infan-edukadon (ne frapadon de junaj infanoj/beboj kiel metodon de edukado)", ke "ni agu por pli

justa mondo kaj ekonomio respektema al homaj rajtoj kaj ekologio", ke "ni luktu kontraŭ la akaparo de tero (angle *land grabbing*)", kaj ke "ni ne pensu nur pri profito sed unue pri la ĝenerala bonfarto de la popoloj". Eble ion similan havis en la kapo la homo, kiu skribis ke ni devus "subteni iliajn registarojn kontraŭ dekstruloj kaj maldekstruloj". Ĝenerale, temas pri kontraŭkapitalisma sinteno, kaj pro tio aperas sugestoj, kiel "helpi al konekto de la movado favore al rifuĝintoj kun tiuj, kiuj helpas aliajn viktimojn de kapitalismo (ekzemple, senhejmuloj kaj senlaboruloj) kaj tiel kunigi la materiajn bazojn de la kontraŭfremdulaj reagoj". Alivorte, por sukcese influi en tiu ĉi afero oni bezonas kunordigon kun aliaj progresemaj movadoj, kaj tiuj ĉiuj kune devas lerni unu de la aliaj. Eble pro tio, la neceso de lernado specife emfaziĝas en pluraj sugestoj. "Unuavice ni devas lerni pri problemoj kaj laŭeble ni vizitu militajn regionojn". Tiurilate denove aperas la nepreco de kunlaboro kun lokaj samideanoj. "Ni konu esperantistojn el nestabilaj regionoj" kaj eĉ "fuĝanto-esperantisto prelegu pri sia lando".

Krom la esenca tutmondiĝa aliro de esperantistoj, oni vidas duan kialon por ke ni aktivu en tiu ĉi temo: la potencialon de nia komunumo. "Ni havas intiman samideanan ligon, do ni povas kolekti kaj interŝanĝi informojn pri rifuĝantoj por helpi ilin kunlabore". Mi persone multe profitis de tiu reto kaj pro tio mi devas sincere danki al pluraj homoj, kiel Roko JULLIEN, kiu aktivas en la franca urbeto *Arràs* en pluraj sociaj movadoj, kaj kiu helpis min kontaktiĝi kun la lokaj aktivuloj pri rifuĝantoj por mia esploro.

Tiu ĉi teksto celis riĉigi la debaton kun argumentoj kaj kun konkretaj ideoj, komune ellaboritaj.

Mi finas ĝin pere de jena propono: "se iu agas per Esperanto por starigi helpon, ni subtenu ŝ/lin". Jen ora principo por gvidi nian aktivadon. Alivorte, ni subtenu la iniciatintojn de la imitinda farado, kiel la menciita agado de Hélène DUBOIS. Tiusence, estas aliaj laŭdindaj iniciatoj. Ekzemple, Pieter ENGWIRDA, kiu klopodis organizi Esperanto-kursojn en loka azilcentro en Nederlando kaj kiu kontaktis min petante internacian subtenon. Ĉu eble ankaŭ la nacia asocio povus helpi tiurilate? Simile, en la Mezorienta Kunveno de 2016 en Urgupo (Turkujo), oni diskutis pri instruado de Esperanto al rifuĝintoj, en debato partoprenita interalie de Renato CORSETTI kaj Johan DERKS. Krome, Annie GRENTE, kiu volontulas en norda Grekio, plurfoje havis la permeson paroli al rifuĝintoj pri Esperanto kaj la rezultoj estas esperigaj. Tiurilate ŝi ekkonis la hispanan asocion *Himaya* (http://himaya.es), kiu helpas familiojn tie kaj kies membroj kunlaboras per la hispana, kaj tio havas neatenditajn sekvojn: "Kiam mi estis tie, pli kaj pli da rifuĝintoj volis lerni la hispanan pro tio!", – rakontas Annie, kiu vidas tiun asocion kiel eblan modelon por la Esperanto-movado.

Ĉu oni jam rikoltis sufiĉe da intereso kaj emo kunlabori por starigi internacian stabilan kunordigon de aktivado por rifuĝintoj per Esperanto? Ĉu ekzistas hodiaŭ iu alia maniero apliki plej klare kaj preme la internan ideon de nia kara lingvo?

Xavi ALCALDE
La Balta Ondo


ESPERANTO
Zamenhof-Tago
Esperanta Libro-tago
15.12.2017
Kiam la popoloj povos libere
sinkompreni, tiam ili ĉesos
reciproke sin malami.
AUTORO DE ESPERANTO
LL ZAMENHOF
1859 1917
POLSKA 60 GR